**ISSN: 0827-3154** **Revuo de Kanada Esperanto-Asocio**

**2009/2** **Aŭtuno 2009**

Mailed under Canada Post Publications Mail Sales Agreement No. 40046355 for the *Lumo*

# LUMO




# Kalgariaj esperantistoj festis ĉe Ateliero Verda en Drumheller

*Lumon* eldonas trifoje en jaro KEA, 6358-A rue de Bordeau, Montréal (QC) Kanado H2G 2R8
*Lumo* ('light') is published three times per year by the Canadian Esperanto Association
*Lumo* ('lumière') est publié trois fois par année par l'Association canadienne d'espéranto

## ENHAVO DE LA NUMERO

**Agado kaj membroj de la kanada Esperanto-Movado**
Ekskurso al Drumheller (P. Hopkins) ... 3
NOREK 2009: Seminarieto pri astronomio (E. Eddy) ... 4
NOREK 2009: Socia evento (P. Hopkins) ... 4
Ni funebras: forpasis Jane Sloan (W. Du Temple) ... 5
Ni funebras: forpasis Jozef Lejderman (K. Price) ... 6
**Loka agado**
Montrealo: la fondintoj de ESK honorigitaj (S. Auclair) ... 7
Toronto : Zamenhofa Festo 2008 (K. Price) ... 7
Informadi vizit-karte (P. Hopkins) ... 8
Vivprotokoloj 2009 (Z. Metz) ... 9
Rezultoj de la referendumo (C. Smith) ... 9
Esperantaj trompoj (Y. Bellefeuille) ... 10
Humphrey Tonkin 70-jara ... 10
Nia enigmo (D. Reble) ... 11
Solvo de la pasint-numera enigmo ... 12
Mi kalkulas per abako (B. Arthur) ... 13
Oferto de la Libroservo de KEA ... 14
Redaktora angulo ... 14
Kalendaro:
Regulaj kunvenoj en Kanado ... 16
Kanadaj Esperanto-renkontiĝoj dum decembro 2009 ... 16

Eldonkvanto de ĉi tiu numero: 200
Redaktis: Paul Hopkins
Fonto de la fotoj: Y. Komori (kovrilo); P. Hopkins (p. 3,4,5,14), W.G. Du Temple (p. 5), K. Price (p. 6,7,8), *La Riverego* (p. 8), Eldonejo Mondial (p.9), Y. Bellefeuille (p. 10), Vikipedio (p. 10)
Provlegis: Ken Price, Allan Simon, Bob Williamson
Presis kaj distribuis: Yves Bellefeuille

Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj. Manke de indiko pri aŭtoro, respondecas la redakcio. Niaj artikoloj kaj informoj povas esti parte aŭ plene republikigitaj por laŭleĝaj uzoj, kondiĉe ke oni citu la fonton. Ni invitas niajn legantojn sendi siajn taksojn, opiniojn, kaj kritikojn, kio ebligos plibonigon de la revuo. *Lumon* senpage ricevas la membroj de Kanada Esperanto-Asocio. Malnovaj numeroj de *Lumo* estas ŝuteblaj de la adreso: **http://www.gazetejo.org/eo/lumo**

### SE VI ANKORAŬ NE REALIĜIS AL KEA POR 2010, BV. FARI TION NUN!

Por (re)aliĝi al Kanada Esperanto-Asocio, sendu ĉekon por $30 al

Kanada Esperanto-Asocio
p/a Yves Bellefeuille, kasisto
2372 Haddington
Ottawa (ON) K1H 8J4

# Ekskurso al Drumheller

Iom post la tagmezo de dimanĉo, la 2-a de aŭgusto, kolektiĝis ĉe Ateliero Verda (Galerio kaj Studio) en Drumheller ok esperantistoj de Suda Alberto*: ses loĝantaj en Kalgario, unu loĝanta en Kalgario kaj Drumheller, kaj unu loĝanta en la vilaĝo Dalum apud Drumheller.




La redaktoro kun edzino **Maria** inter **Milan** kaj **Jacqueline Sveda**, mecenato kaj estrino de Ateliero Verda

La esperantistoj de Alberto multe ĝojas pro Ateliero Verda, ĉi tiu esperantista entrepreno pri kiu legantoj de *Lumo* povis legi en numero 2009:1 (p. 4), kaj la vizitantoj detale rigardis la elmontraĵojn kaj la malgrandan informo-centron pri Esperanto tie dum ni atendis la alvenon de malfruuloj. Kiam kredeble (sed ne vere – vidu sube) ĉiuj ekskursanoj estis alvenintaj, galeriestrino Jacqueline fermis la pordojn, kaj ni ĉiuj veturis iom norden al piknikejo apud orienta bordo de la Rivero Red Deer (Ruĝ-Cerva), kie ni tagmanĝis kune.



Esperantistoj (maldekstre **Milan**, dekstre **Maria**) sur riverpramo Bleriot

Post la piknika tagmanĝo la ekskursanoj pluveturis norden laŭ la Rivero Red Deer sub la kapabla gvidado de **Jeff Day** el Dalum, kaj ni haltis proksime de la fama Reĝa Muzeo Tyrell por viziti faman kirketon (Little Church), plene funkcia preĝejo kie laŭdire povas kunpreĝi dekmil homoj ... po sesope. Poste ni pluveturis norden kaj transiris la riveron per la pramŝipeto Bleriot, unu el la lastaj ankoraŭ funkciantaj river-pramoj de Kanado, kaj revenis al Drumheller laŭ la okcidenta bordo de la rivero, haltante survoje ĉe elrigarda punkto por vidi la belan valon de la rivero Red Deer.

Kiam ekskursanoj revenis al Ateliero Verda finiĝis la oficiala parto de la ekskurso kaj iuj el ni ekveturis hejmen. Kelkaj tamen restis pli longe, kio ebligis al ni kunveni kun malfrua alveninto el Kalgario (**Jean François**). Por ke ankaŭ li ĝuu la ekskurson ni do aldonis neoficialan programeron, kiun konsistigis babilado en la galerio kaj kuna vespermanĝado en restoracio proksima al la Ateliero.

— Paul Hopkins



**Jean-François** kaj **Milan** babilas en Ateliero Verda

* Laŭ Benson-vortaro (*Comprehensive English-Esperanto Dictionary*, 1995) nia provinco nomiĝu « Albertio », sed laŭ la ĝenerala lingvo-uzo kanade kaj internacie – ekzemple, en Vikipedio – ĝi estas « Alberto ».

## NOREK 2009: Seminareto pri astronomio

[Pli detala raporto pri la tema pritraktado de NOREK 2009 aperos en la sekva numero de *Lumo*.]

Perfekta septembra vetero benis la proksimume 20 Esperanto-parolantojn kiuj kunvenis en la urbeto Sidney sur la insulo Vankuvera por NOREK (Nord-Okcidenta Regiona Esperanto-Kunveno) 2009. Ili venis de Kalgario, kelkaj lokoj en Brita Kolumbio kaj diversaj partoj de la ŝtato Vaŝingtonio en Usono. Agante laŭ la temo de la Unuiĝinta Naciaro por 2009 "Internacia jaro de astronomio", partoprenantoj dividis informojn pri nia universo. Ni lernis pri la originoj de astronomio de **Paul Hopkins**, pri detaloj de la planedo Marso de **Ralph Gonyea** kaj pri la vivo de frua dana astronomo Tycho Brahe de **Olga Du Temple**. Aliaj prezentadoj temis pri NASK, la lingva programo Eurotalk, Lanĉilo (Springboard to Languages) kaj planoj festi la 150-an datrevenon de L.L. Zamenhof. Unu ideo tiurilate estas festado de tiu grava dato kaj samtempe la reaktivado de la UEA-oficejo ĉe la UN-konstruaĵo en Novjorko per malferma akcepto en tiu impona loko. **Wally Du Temple** menciis ke Esperantic Studies Foundation partoprenos en tiuj planoj.



Ralph Gonyea prelegas pri Marso



Ellen Eddy (dekstre) atente aŭskultas prelegon de Olga Du Temple




La NOREK-anaro ĉe Instituto Herzberg

Bonŝance, tiutempe la loka observatorio Herzberg Institute of Astrophysics (Instituto de Astrofiziko) festis la Jaron de Astronomio per malferma tago. La grupo havis okazon viziti la diversajn konstruaĵojn kaj informiĝi pri la plej lastaj paŝoj en tiu scienco. Je la fino de la oficiala programo, okazis vizito al la Shaw Ocean Discovery Centre (Oceana Eltrova Centro) por spekti la lokajn maraĵojn.

Laŭ la kutimo de NOREK, la venonta kunveno estos ie en nord-okcidenta Usono.

— Ellen Eddy

## NOREK 2009: socia evento

Longtempaj partoprenantoj de NOREK atendas ne nur lerni ion sed ankaŭ revidi malnovajn amikojn kaj ekkoni novajn. Ankaŭ ĉi tiel estis dum NOREK 2009. Oni havis multajn okazojn babili kaj konatiĝi unuj kun la aliaj: antaŭ kaj fine de la programo, dum paŭzoj inter prelegoj, dum la ekskursoj kaj dum la komuna vesper-manĝo.

En la kunvenejo, la konferenca ĉambro de hotelo Victoria Airport Travelodge en Sidnejo, oni havis ne nur konferencan tablon, ĉirkaŭ kiu sidas la ĉeestantoj dum prelegoj, sed apude malgrandan ekspozicion pri Esperanto kaj libroservon, ĉe kiu vendiĝis libroj novaj kaj malnovaj, multaj el ili duoblaĵoj el la ampleksa libro-kolekto de familio Du Temple, arto-kartoj el la post-



Deko da NOREK-anoj portas ĵus aĉetitajn antaŭtukojn kun la simbolo de KEA

lasaĵo de Jane Sloan (vidu la nekrologon sube), kaj restantaj ĉemizoj kaj antaŭtukoj kun la emblemo de Kanada Esperanto-Asocio.

Aŭdiĝis dum la kunveno krom prelegado kaj babilado ankaŭ multa kantado. La Esperanto-klubo de Victoria havas longan tradicion de esperant-lingva kantado, subtenado de akompanado far Ralph Gonyea, kiu ne nur prezidas la grupon sed ankaŭ estas muzikisto laŭ profesio. Dum la bonveniga (vendreda) vespero kaj dum la vespera programo de sabato la partoprenantaro de NOREK ĝoje kunkantis. Dimanĉon matene oni ankaŭ solene fermis la kunvenon per kantado de la himno.

— Paul Hopkins

## Jane Sloan

(1923-2009)

Jane Sloan estis bone konata profesia fotografisto kaj sendependa foto-ĵurnalistino en la kanada provinco Brita Kolumbio. Ŝiaj fotoj aperis en la renomaj gazetoj *Time* kaj *Life*, en pluraj kanadaj ĵurnaloj, kaj en libro pri ruso-kanada ortodoks-religia sekto kun la titolo *Terror in the Name of God* (autoro: S. Holt).

Flanke de la sukcesa profesia kariero Jane konatiĝis amatore kiel kaligrafo kaj retuŝisto: ŝi restaŭris centojn da antikvaj, ofte damaĝitaj, familiaj kaj historiaj fotoj por privatuloj kaj muzeaj kolektoj.

Ĉio supre menciita estas eĉ pli rimarkinda, kiam oni scias, ke Jane estis naskita kun severe deformita dekstra brako.

Jane lernis Esperanton en 1973 kaj ekde tiam aktivis en la loka klubo kaj dum la internaciaj Esperanto-renkontiĝoj NOREK. Ŝi gvidis kelkajn Esperanto-kursojn kaj dum multaj jaroj estis korektanto de la per-poŝtaj Esperanto-kursoj.

— Wally Du Temple



Jane Sloan kiel fotistino en 1942



Jane kun sia amata hundo Emily en 1996

## Josef Lejderman

Josef Lejderman, la plej aĝa esperantisto en Toronto, forpasis la 13-an de aŭgusto 2009. Li estis 97-jaraĝa, kaj eĉ en la lastaj jaroj propagandis Esperanton inter la loĝantoj de Chester Village, kie li loĝis.


Jozefo naskiĝis en Varsovio (Pollando) kaj fariĝis ŝip-inĝeniero. Bonŝance, eĉ pli ĉar li estis judo, li estis ekster Eŭropo kiam la dua mondmilito komenciĝis en 1939.

Post la milito li lasis la maristan vivon, kaj dum iom da tempo en 40-aj jaroj li loĝis en Londono (Anglujo). Tiam li edziĝis al aŭstrino, Ella.

Joe jam parolis kelkajn lingvojn, inkluzive la polan, germanan, anglan, hispanan, kaj Esperanton. Li ĉeestis kunvenojn de la Londona Esperanto-Klubo.

Kvankam liaj patro kaj frato estis elmigrintaj al Argentino, Jozefo venis al Kanado, kaj laboris en la poŝtoficejo en Toronto dum jaroj. Pro vespera aŭ nokta laboro li nur de tempo al tempo povis iri al kunvenoj de la Esperanto-klubo. Li tre ŝatis la internan ideon de d-ro Zamenhof pri la frateco de la tuta homaro.

Joe ĉiam estis ege propagandema – eĉ tro laŭ multaj klubanoj. Ili ne akceptis lian proponon ke ili staru ĉe ĉefaj stratkruciĝoj portantaj reklam-afiŝojn sur siaj dorsoj kaj ventroj.




Tridek jarojn poste, post emeritiĝo, Joe fariĝis prezidanto de la klubo en Toronto, dum periodo kiam neniu alia volis akcepti la postenon. Li tiam sukcesis aperigi longan artikolon, kun fotoj, en la prestiĝa ĵurnalo *Globe & Mail*.

Memorkunveno por lastatempaj forpasintoj okazis en maljunulejo Chester Village lundon la 28-an de septembro. En tiu kunveno John Lejderman, la filo de Joe, havis nur iomete da tempo paroli pri sia patro, kaj lia pasio pri Esperanto, ĉar estis multaj forpasintoj.

John transdonis al nia klubo la Esperantajn librojn de sia patro.

Kondolencojn al John, kaj al Ella, la edzino de Joe dum pli ol 60 jaroj, kiuj pluvivas.

— Ken Price

Ankoraŭ du!

La redaktoro lastatempe eksciis ke ĉi-aŭtune mortis alia konata esperantisto de Toronto. **Adrian Boldan** mortis en trafik-akcidento la 17-an de novembro. Nekrologo aperos en la sekva numero de *Lumo*. La 8-an de decembro mortis 78-jara en Tri-Riveroj **Liliane Laprise**, dumviva membro de KEA; kiu konis ŝin kaj ŝian agadon, bv. sendi raporteton al la redakcio.

# Novaĵoj el la lokaj kaj regionaj asocioj kanadaj

## Montrealo

### La fondintoj de ESK honorigitaj

(el *La Riverego*, n-ro 94, decembro 2009)

Per neformala interŝanĝo de komputilaj retleteroj, la estraro de la Esperanto-Societo Kebekia decidis nomumi kiel honorajn membrojn la du fondintojn de nia Societo, nome **Zdravka Metz** kaj **Normand Fleury**.



La familio Metz-Fleury uzas Esperanton kiel familian lingvon jam de 25 jaroj.

Normando lernis Esperanton dum lerniga vojaĝo en Eŭropo, fine de la sepdekaj jaroj. Li konatiĝis kun Zdravka, juna kroata esperantista aktivulino, dum la Internacia Junulara Kongreso okazinta en Raŭmo (Finnlando) dum la somero de 1980.

Post ilia geedziĝo kaj posta alveno al Kebekio, ili okupis diversajn postenojn en la Kanada Esperanto-movado, lige kun la okazigo de Universala Kongreso en Vankuvero, animigis la Montrealan kluban vivon kaj iniciatis la fondon, kune kun Ŝerbrukaj Esperantistoj, de la Esperanto-Societo Kebekia.


Normando prezidis la Societon senĉese ĝis la pasinta jaro [2007] (sed plu estas en ĝia estraro, escepte en la kadro decidi nomumi lin kaj lian edzinon honoraj membroj...), ĉeforganizis la oftajn renkontiĝojn, kiuj estas la centra celo de la Societo, kaj regule renkontiĝis kun gazetistoj koncerne Esperanton. Ĉiam plu liaj agadoj en la Montreala kaj kanada niveloj.

Unua kasisto de la Societo, Zdravka okupis diversajn postenojn en la Kebekia Esperanto-movado, ĉu formale kaj kadre de ESK, ĉu neformale. Ŝi kunhelpis al Normando por organizi eventojn, gvidis kursojn kaj vesperojn, laboris pri libroj k.t.p. Kaj ŝi naskis kaj edukis du denaskajn Esperantistojn!

De pli ol 20 jaroj, Zdravka kaj Normando konsistigas la kernon de la Esperanto-movado en Montrealo kaj en Kebekio. Ili plej multe meritas tian honorigon.

— Sylvain Auclair

## Toronto



Torontaj esperantistoj kaj gastoj festas Zamenhof-Tage (2008)

La Zamenhofa Festo de la Esperanto-Rondo de Toronto 2008 okazis sabate la 13-an de decembro, en la sama loko kiun ni uzas jam dum kvin jaroj, la festo-ĉambro de la konstruaĵo ĉe 77 Carlton Street de la 2-a horo ptm ĝis proksimume la 10-a horo ptm.

Ni bonŝancis ke partoprenis kvin esperantistoj el aliaj urboj, nome: **Stefano** (Rochester NY), **Vernero** (Tonawanda NY), **Saĉiko** — kiun ni renkontis la unuan fojon — el Niagara Falls (ON), kaj **Mateo** kaj **Patriko**, ambaŭ el

Hamiltono.

Kiel kutime, ni ne sukcesis manĝi ĉion!

— Ken Price



Dum ERT-kunvenoj oni kutimas babili en komfortaj seĝoj kaj muzikumi

## Informadi vizit-karte

La esperantistoj de Kalgario estas konataj pro sia emo informadi pri Esperanto je plej diversaj okazoj. Jam antaŭ tridek jaroj kalgariaj esperantistoj atentigis la ĝeneralan publikon pri nia lingvo per ornamita aŭto en la granda Stampeda Parado: **Yoshiki Komori**, daŭre aktiva en la Kalgaria Esperanto-Rondo – li estas en la foto sur la kovrilo de ĉi tiu numero – veturigis tiun aŭton. Komence de ĉi tiu jardeko la entrepreno Esperanto Antaŭen de **David Yaki** informadis la publikon pri nia lingvo per surstrataj ekspozicioj kaj pord-al-porda vendado.

Al la nuna sekretario de Kalgaria Esperanto-Rondo, **Milan Sveda**, ankaŭ gravas la informado. Unu frukto de liaj penoj estas la Esperanta karaktero de Ateliero Verda, en kiu troviĝas – apud la laborejo kaj artaĵoj de **Jacqueline**, renoma artistino kaj edzino de Milan – modesta informejo pri Esperanto (vidu la artikolon "Ekskurso al Drumheller" sur paĝo 3). Alia estas informa karto, en formato de vizit-karto, per kiu membroj de la Rondo povas nun doni al interesitoj bazajn informojn pri nia lingvo kaj samtempe ankaŭ informojn pri niaj kunvenoj: tempo, loko, kion oni atendu, kaj kiel havi pliajn informojn. Iuj kartoj ĉiam disponiĝas en la kafejo kie ni kunvenas kaj babilas – donante al interesitoj okazon konstati ke per ĉi tiu lingvo oni ja povas vigle komuniki – aliajn disdonas membroj de la Rondo okaze de konversacioj, kiam leviĝas la temo "Esperanto". Por multaj ricevantoj de la karto, eble la plej surpriza fakto lernata estas tiu ke esperantistoj regule kunvenadas en ĉi tiu urbo, **ke Esperanto vivas!** Se esperantistoj de aliaj urboj sekvos ĉi tiun ekzemplon, eble oni malpli aŭdos la senkulpigojn "Mi ne sciis ke Esperanto ankoraŭ estas parolata" kaj "Mi volis kunveni kun esperantistoj, sed mi ne sciis kiel trovi ilin".

**Kalgaria Esperanto-Rondo**
*(Fondita 2007)*

**Calgary Esperanto Group**

***Discussion group - mostly in Esperanto language***
***newcomers / visitors welcome***

Meetings every Monday @ 7-9 PM **Second Cup Kensington**
338 - 10 Street NW, Calgary (near the Sunnyside LRT station)

**For info call: (403) 239 6528; Inquiries by e-mail:** msveda@highout.com

**Esperanto is:**

**The easiest useful language, used by millions world wide.**

**It has tens of thousands of books, plus magazines, CDs, DVDs, radio broadcasts and millions of internet sites.**

**In use over 120 years and spoken at hundreds of international, national and regional congresses and meetings annually.**


**Already used as an electable language of instruction in 68 Universities in 24 countries.**

http://esperantocalgary.blogspot.com
http://www.esperanto.ca
http://esperanto.net/info/index_en.html
http://en.lernu.net

— Paul Hopkins

## Vivprotokoloj 2009

**http://www.librejo.com/vivprotokoloj.html**




La 15-an de decembro esperantistoj festas (Zamenhof-Tagon kaj) la Tagon de Esperanto-libroj, sed ĉiu tago de la jaro estas bona por havigi al si novan Esperantan libron.

Universala Kongreso 2009 okazis en Bjalistoko por festi ĉi-jare la 150-an datrevenon de la naskiĝo de L.L. Zamenhof.

Por ĉi-kongreso, la eldonejo Mondial en Novjorko realigis la duan, pli ampleksan kaj pli altkvalitan eldonon de la libro *Vivprotokoloj*.

La libro estas kolekto de 31 rakontoj pri 31 simplaj homoj kiuj havas diversajn aĝojn, profesiojn, naciojn, kulturojn; kiuj havas sian familion aŭ kiuj vivas sole. Foje ili konas unu la alian, foje temas pri izoluloj: tute novaj komencantoj aŭ elstaraj, konataj movadanoj. Tio kio unuigas ĉiujn estas Esperanto. Ili ĉiuj lernis la lingvon: ĉu studante grupe, ĉu solaj per koresponda metodo, instrulibro aŭ per komputilo.

*Vivprotokoloj*-n redaktis, post interparolado aŭ korespondado, Ulrich Becker kaj Zdravka Metz. La ideo pri tia libro venis de MONDA KUNAGADO, movado por Edukado, Scienco kaj Kulturo.

Legante pri la vivo de esperantistoj, oni lernas pri kutimoj en iu lando, pri ĝia kulturo, historio, tradicioj, rilatoj familiaj kaj amikaj, pri loĝado kaj translokiĝado - la ĉiama migrado de homoj pro plej diversaj kialoj...

*Vivprotokoloj* havas 214 paĝojn kaj aĉeteblas ĉe la Libroservo de KEA kontraŭ 15 $.

— Zdravka Metz

## Rezultoj de la referendumo

Mi skribas por anonci la rezulton de la estrara balotado de KEA por la deĵorperiodo 2010-2011. Kelly Wylie kaj mi nombris la balotilojn hieraŭ vespere. Ĝis la limdato, la 21a de decembro 2009, estis ricevitaj 65 balotiloj, ĉiuj validaj. La rezulto estas:

| | **por** | **kontraŭ** | **sindeteno** |
|---|---|---|---|
| Yves Bellefeuille | **59** | **2** | **4** |
| Dan Campbell | **58** | **1** | **6** |
| Geoffrey Greatrex | **58** | **1** | **6** |
| Paul Hopkins | **59** | **1** | **5** |
| Shai Mor | **47** | **4** | **14** |
| Ken Price | **63** | **0** | **2** |
| Bob Williamson | **58** | **0** | **7** |

Sekve ĉiuj kandidatoj estas elektitaj.

La elektitoj oficos de la 1-a de januaro 2010 ĝis la 31-a de decembro 2011.

— Clayton Smith

## Esperantaj trompoj

Hodiaŭ mi gajnis US$ 2 500 000 en lotumado. Krome oni petis min okupiĝi pri trans-pago de 193 milionoj da usonaj dolaroj kaj de sep milionoj da britaj pundoj, kontraŭ kio mi ricevos malavaran parton de la transpagota sumo.

Homoj kiuj uzas ret-poŝton nun kutimas ricevi tiajn mesaĝojn, kiuj kompreneble estas fraŭdaj. Tamen ne ĉiuj esperantistoj konscias, ke ankaŭ aliaj esperantistoj sendas tiajn trompaĵojn.

Antaŭ deko da jaro, mi ricevis leteron de Esperanto-grupo en Ĉinio kiu asertis, ke ĝi volas konstrui statuon de Zamenhof alta je 120 metroj, se mi bone memoras. Ĉu mi ne bonvolas donaci mil usonajn dolarojn por helpi tion? Unue mi pensis ke la homoj simple estas naivaj, sed poste montriĝis ke la afero fakte estis trompo. Kaj oni tiom misuzis la Jarlibron de UEA por sendi tromp-mesaĝojn en Esperanto el Niĝerio ke UEA nun rifuzas entute sendi la Jarlibron al tiu lando.



La aŭtoro de ĉi-artikolo,
Yves Bellefeuille

Se vi ricevas ret-mesaĝon en Esperanto similan al la fraŭdaĵoj kiujn vi kutimas ricevi en la angla kaj aliaj lingvoj, traktu ĝin kun same multe da dubo. Ne sendu iom ajn da mono sen kontrolo, kiom ajn laŭdinda ŝajnas esti la celo de la peto.

## Humphrey Tonkin 70-jara

[Humphrey Tonkin longe vivis en Potsdam NY apud la kanada landlimo kaj ofte kontribuis al la informa laboro en nia lando – laste per longa intervjuo disaŭdigita per radio CBC/RTC en 2008. Li estas bona amiko de la kanada Esperanto-movado. Ĉion bonan okaze de ĉi tiu datreveno! psh]



Humphrey Tonkin

La 2-an de decembro festis sian 70-an datrevenon prof. Humphrey Tonkin, eksa prezidanto de UEA kaj TEJO. Tonkin, kiu esperantistiĝis en 1956, estis estrarano de TEJO de 1961 ĝis 1971, de 1969 ĝis 1971 kiel prezidanto. En tiu periodo li fondis la revuon *Kontakto* kaj estis ĝia unua redaktoro. En 1974 li fariĝis prezidanto de UEA, kiun funkcion li plenumis dum du periodoj ĝis 1980. Kiel prezidanto li gvidis la redaktadon de la Statuto de UEA kaj firmigis la eksterajn rilatojn de la Asocio, i.a. kreante la Oficejon de UEA ĉe UN en Novjorko. Dum sia tria mandato kiel prezidanto, 1986-1989, li donis gvidon i.a. al la Jubilea Jaro de Esperanto 1987. En 2001 li revenis al la Estraro de UEA kiel vicprezidanto por unu trijara periodo. Li estas Honora Prezidanto de TEJO kaj membro de la Honora Patrona Komitato de UEA. Li estas ankaŭ longtempa direktoro de la Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj (CED) kaj kunredaktoro de ĝia revuo *Language Problems & Language Planning*. Tonkin estas konata ankaŭ kiel aktiva aŭtoro, tradukisto kaj recenzisto, kaj kiel ŝatata oratoro.


el *Gazetaraj Komunikoj de UEA* n-ro 350, 2009-12-02

## Nia enigmo

Dekstre: nova krucvort-enigmo de **Don Reble**

La nomoj de tiuj kiuj sendos siajn solvojn al la redaktoro aperos en la sekva (aŭ post-sekva) numero de ĉi tiu revuo.

Bonŝancon!



### Ŝlosiloj (r = radiko)

**Dekstren**

1 sirop-arbo (r)
5 (iujn) pretigantajn enhavon de eldono
13 unuon de povo
15 insekto kun duonelitroj
16 sufokanta serpento (r)
17 faras kambion, por ke banko pagu al kreditoro
19 bati pilkon en dek ok truetojn (r)
21 produkti ian efikon
22 liberigi el danĝero (r)
24 sen iu alia
26 varmigi ies ovojn (r)
27 miksadi farunon kaj akvon (r)
29 kristalan dolĉaĵon
32 arbaĵon
34 buŝaj ulceretoj
36 regnestro
37 balancete dormigi (r)
39 bruna rezino uzata en verniso (r)
40 vigliga interjekcio
41 montru sin
43 asekuraj dokumentoj
45 plej ofta civitano (r)
46 oblikvigi (r)
47 malsano pro manko de vitamino B1 (r)
48 postuli liveraĵon (r)
49 alta konstruaĵo (r)
50 faras ion malkuna
51 kunligu libropaĝojn
52 treege juna koko (r)
53 nefermentita pano (r)
54 korpe bonstata (r)
55 kuvo da lavakvo
56 disĵetis ĝermontaĵojn
58 komenco de semajnfino
60 kaŭzos senton, rememoron, k.a.
62 rilata al flarorgano
63 ne tiu (r)
64 limstreko (r)
66 ne akompanata (r)
67 modela trajtaro (r)
68 ebenaĵo el kio io kontrastas
70 nomo de fama baptisto
74 ĉiuj kunapartenaĵoj
75 muzika kunludantaro (r)
77 vapor-amasaj
78 importas kontraŭleĝe
79 suomo (r)

**Suben**

1 memlernintoj
2 regnestro de Rusio (r)
3 greka litero "H" aŭ "η"
4 kunirantaro (r)
6 sufikso de stato
7 kontraŭinunda muro (r)
8 kore ŝatos
9 statuego (r)
10 antikvaj kalkuliloj
11 sistemon de meditado, kiu unuigus animojn
12 sensperte kredema (r)
14 eliru el patrino
18 travaskulaĵo
20 movanta kiel akvo

23 alproksimiĝi (r)
25 kovriĝi per koloraj plantoj (r)
28 faris malagrablan korposenton
30 malgrandaj
31 malmola terparto (r)
32 gajni scion (r)
33 deklaras ion nevalida
35 ŝoforojn
36 sinmovi denove (r)
38 civitano en Bejruto (r)
40 civitano de plej granda demokratio (r)
42 falanta gutaro (r)
43 mezuri pezon (r)
44 tiom da edroj en kubo
45 kunligita sinsekvo de ringoj
47 durada veturilo (r)
48 subtera, submara bombo
50 ina ludkarto
51 severan kontraŭadon
53 laredo (r)
55 malsuproj de konstruaĵoj
56 folieton de kartoteko
57 bezoni trinkon (r)
59 malalta kantvoĉo (r)
60 movo eksteren
61 tro moda
63 komenci batalon (r)
65 malviran
69 monteto da akvo (r)
71 ungego (r)
72 Kristnaska arbo (r)
73 notinde malgranda (r)
76 prepozicio de kvanto

☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆

**Solvo de krucvort-enigmo (aperis en *Lumo* 2009:1)**

Ĉi-dekstre: la solvo de la krucvort-enigmo aperinta en la pasinta numero de *Lumo*. La redakcion atingis plene ĝustaj solvoj de du legintoj: **Olga Du Temple** kaj **Stevens T. Norvell**.

Gratulon al ili kaj ankaŭ al ĉiuj, kiuj provis solvi la enigmon!


| | | | | | | | | | | | | | | | | | | |
|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|
| | | | S | I | L | A | B | | | | R | O | Z | A | N | | | |
| | A | K | U | T | | T | A | G | | P | A | L | | N | O | V | A | |
| | R | I | Ĉ | A | | U | N | U | F | O | J | E | | A | M | E | L | |
| I | D | E | A | L | | T | U | M | U | L | T | O | | L | A | R | I | K |
| K | O | N | S | O | L | O | | I | N | K | O | J | | I | D | A | R | O |
| S | | | | | | N | E | S | T | O | J | N | | Z | | | | L |
| O | R | D | E | N | O | | M | | | | | | L | I | T | O | V | O |
| N | E | O | N | O | N | | O | R | D | E | N | D | A | | O | F | E | R |
| | T | R | U | D | I | | C | | I | | O | | M | A | N | I | K | |
| | | M | | | | | I | N | K | U | B | | | | | C | | |
| | K | E | S | T | O | | I | | A | | L | | A | M | P | O | L | |
| V | I | T | O | | P | U | S | I | N | T | A | | G | A | L | J | O | N |
| I | N | U | N | D | I | | | | | | J | | I | R | I | N | T | A |
| D | | | | R | | K | A | V | E | R | N | O | | | | | | N |
| V | U | A | L | I | | A | B | A | T | O | | R | I | M | O | N | T | A |
| O | R | F | A | N | | R | E | G | A | N | T | A | | A | L | E | O | J |
| | B | E | N | K | | A | L | O | N | Ĝ | O | N | | R | I | T | M | |
| | O | R | G | I | | F | O | S | | U | R | Ĝ | | Ŝ | V | E | B | |
| | | | O | S | T | O | J | | | | N | A | Z | I | O | | | |

La estraro de Kanada Esperanto-Asocio
kaj la redakcio de Lumo
deziras al ĉiuj legantoj
tre feliĉan Novan Jaron 2010

## Mi kalkulas per abako


Abako estas ilo per kiu oni povas kalkuli. Abako havas bidojn, kiujn oni povas glitigi por adicii aŭ subtrahi. Dum multaj centoj da jaroj homoj uzis abakojn, sed abakoj ne plu multe uziĝas, ĉar oni povas uzi elektronikajn kalkulilojn. Mi tamen ankoraŭ uzas abakon.

Abako estas simpla ilo, kvankam oni devas ekzerci sin iom por povi iun uzi senerare. Abakoj havas kolumnojn. Apude oni povas vidi la bildon de malgranda abako kun tri kolumnoj. La dekstra kolumno reprezentas nombrojn inter nulo kaj naŭ. La meza kolumno reprezentas dekojn; tio estas: dek, dudek, tridek kaj simile. La maldekstra kolumno reprezentas centojn.



Abako havas du partojn. La malsupra parto havas bidojn kiuj reprezentas unuojn, kaj la supra parto havas bidojn kiuj reprezentas kvinojn. Kiam oni legas abakon, oni rigardas la bidojn kiuj estas ĉe la meza lato. Ekzemple, la abako en la ĉi-supra bildo montras la nombron 125.

Por kalkuli, oni glitigas aŭ ŝovas bidojn. Ekzemple, por adicii 53 al 125, oni glitigas bidojn kiel en la apuda bildo. Vi povas vidi ke la sumo estas 178 (7 = 5 + 2 kaj 8 = 5 + 3).



Tio ĉi estas simpla ekzemplo. Ofte oni devas uzi kombinon de nombroj. Ekzemple, se oni volas adicii 80 al la ĉi-supra nombro, oni unue adicias 100 kaj sekve oni forprenas 20.

Tiel oni adicias. Por subtrahi, oni faras same, sed oni glitigas la bidojn al la mala direkto.

Mi legis iom pri la historio de abakoj. Mi ĉiam aŭdis ke abakoj estas de Azio, sed mi legis ke ankaŭ eŭropanoj uzis ilin antaŭ multaj jaroj. Kiam eŭropanoj tamen komencis uzi arabajn ciferojn, surpapera kalkulado estis tiom pli facila ke la eŭropanoj malpli multe bezonis abakojn. Romaj ciferoj estis multe malpli bonaj por surpapera kalkulado. (Kiam mi unue konatiĝis kun romaj ciferoj, mi ne komprenis, kial oni inventus tian strangan cifer-sistemon, sed post kiam mi uzis abakon, mi tuj komprenis: la inventinto sendube estis abak-uzanto. Ĉiu litero de roma cifero reprezentas alian specon de bido: I, V, X, L, ktp. Ekzemple, la nombro 125 reprezentiĝas per kvar bidoj de tri specoj – ties roma cifero estas CXXV.)

Mi havas du abakojn. Mi konstruis la unuan el kartono de cereala skatolo. La duan mi konstruis el ligno.

Mi plejparte uzas abakon kiam mi kalkulas miajn kontojn kaj miajn spezojn. Abako estas malpli rapida ol elektronika kalkulilo, sed mi ĝuas uzi kalkulilon kiun mi mem konstruis. Mi ĝuas glitigi la bidojn kaj fine ricevi la ĝustan respondon. (Kelkfoje mi ricevas malĝustan respondon kaj devas rekalkuli. Tio estas malpli amuza.)

Mi ne povas konvinki vin uzi abakon anstataŭ elektronika kalkulilo, sed laŭ mi la abakoj estas amuzaj: estas ja sendanĝera amuzo.

— Bruce Arthur

## Oferto de la Libroservo de KEA

La Libroservo de KEA estas daŭre je via dispono. Ni ofertas centojn da titoloj de libroj kaj ankaŭ de kompakt-diskoj, dovodoj kaj forte rabatitaj kasedoj.

Ni invitas vin konsulti la retan katalogon de la Libroservo:
**http://www.esperanto.qc.ca/katalogo/**

Mendo-formularo facile uzebla troviĝas ĉe la retejo. Atentu ke ni havas nek telefonon nek faksilon. Vi povas mendi rete aŭ perpoŝte.

Ĝuu la legadon!

Normando Fleury
**informo@esperanto.qc.ca**
Respondeculo pri LS de KEA

Jen kelkaj novaj titoloj aldonitaj lastatempe.

**Aventuro en mondo de ŝajnigado**; aŭtoro Jean Codjo; eldonis FEL, 2009, 44p. Temas pri spertoj de Beninano kiu nun vivas en Kanado. Prezo 10.00 $

**La origino de specioj**; aŭtoro: Karolo Darvin (Charles Darwin); tradukis Klivo Lendon; eldonis Flandra Esperanto-Ligo FEL, 2009, 431 p. Ne eblas troigi la gravecon de tiu ĉi verko. La teorio kiun Darvino prezentis en ĉi tiu verko radikale ŝanĝis nian komprenon pri la vivo kaj ĝia historio. Prezo 36.00 $

**Esperanto estas**... Dovodo; aŭtoro Edukado@Interreto; eldonis Espero Priskribo Filmo, 2008. DVD kiu prezentas la internacian lingvon en moderna kaj vigla maniero. La filmo dividiĝas en 6 partoj kaj estas rezulto de 3-jara kunlaboro internacia. 20 subtekstaj lingvoj, 6 voĉaj lingvoj plus filmaj aldonaĵoj. Prezo 8.70 $

**Redaktora angulo**



Niaj planoj estis bonaj, sed la realigo malpli bona. Ideale, ĉi tiu numero de *Lumo* estus aperinta en septembro 2009, sed ĝis la fino de tiu monato – kaj kaj de la sekvaj du monatoj – mankis sufiĉe da bonaj tekstoj por ebligi la finredaktadon de la numero. Finfine, post petado de artikoloj kaj fotoj, post verkado, retajpado, ret-serĉado, kaj multa redaktado miaflanke, kreiĝis io kio plaĉas eĉ al ĉi tiu postulema dumviva membro de KEA: mi esperas ke ĝi plaĉos ankaŭ al vi, karaj legantoj. Bonŝance, mia aktiveco de la pasintaj tri semajnoj alfluigis tiom da materialo, ke la sekva numero kredeble povos aperi ene de la venontaj du monatoj. Restas tamen loko en tiu sekva numero – kaj postsekvaj numeroj – por viaj raportoj, artikoloj, kaj verkoj. Sendu ilin al ĉe la sekva adreso:

**Paul Hopkins < hoppaul ĉe gmail.com > (uzu @ anstataŭ "ĉe")**
**#55 - 9520 Bonaventure Drive SE, Calgary, AB T2J 0E5**


# MORTO DE ARTISTO

Anna Löwenstein



Juna komika aktoro, Prokulpio, estas nura sklavo, kiam li renkontas Neronon ĉe festo. La du junuloj baldaŭ amikiĝas pro sia komuna intereso pri teatro kaj la artoj. Kune ili esploras la noktan vivon kaj aliajn distraĵojn de Romo, ĝis Nerono, nur 16-jara, estas nomumita imperiestro. Kun lia subteno, Prokulpio iĝas la ĉefa organizanto de mirigaj spektakloj prezentataj al la roma publiko, inkluzive de la amasa ekzekutado de fanatika nova sekto, la kristanoj.

Kaj tamen, ne ĉiam facilas esti amiko de imperiestro…




Paĝoj: 624; Formato: 135 x 205 mm
Eldonjaro: 2008
Serio Stafeto n-ro: 33
ISBN: 978-90-77066-39-3
Prezo ĉe FEL: 20,00 EUR + afranko

Mendu ĉe via loka libroservo aŭ rekte
de Flandra Esperanto-Ligo,
Frankrijklei 140, BE-2000 Antwerpen.
Rete: www.retbutiko.net - retbutiko@fel.esperanto.be

# Kalendaro

## Regulaj kunvenoj en Kanado:

**Edmontono** (Alberto): Kunvenoj okazas preskaŭ ĉiun vendredon tagmeze kaj la duan ĵaŭdon de ĉiu monato ekde 19h30. Informoj ĉe **http://esperanto-edmonton.wikidot.com/**

**Halifakso** (Nov-Skotio): Oni kunvenas proksimume dufoje ĉiun monaton ĉe la hejmoj de grupanoj. Informoj ĉe **http://www.esperanto.ca/eo/halifax**

**Kalgario** (Alberto): la Kalgaria Esperanto-Rondo kunvenas ĉiun lundan vesperon inter la 19h00 kaj 21h00 ĉe kafejo Second Cup en distrikto Kensington (338 – 10th Street NW). Informoj ĉe **http://esperantocalgary.blogspot.com/**

**Londono** (Ontario): Esperanto-Klubo en Londono bonvenigas vizitantojn. Skribu al **eolondono@gmail.com** por ricevi informojn pri tempo kaj lokoj de kunvenoj.

**Montrealo** (Kebekio): la Montrealaj Esperanto-Kunvenoj okazos en restoracio **Commensal** (1720 rue Saint-Denis) ekde 19h30 kaj la Montreala Esperanto-Domo (6358-A, rue de Bordeaux) dum la lastaj vendredoj de februaro, marto kaj aprilo (ekde 18h00). [Se vi deziras partopreni la komunan manĝon ĉe MEDO, anoncu vin kelkajn tagojn pli frue kaj venu je 18h00 kun plado; alie, venu je 20h00]. Pliaj informoj (ankaŭ pri la temoj de la kunvenoj) ĉe **http://www.esperanto.qc.ca/eo/activites**

**Otavo** (Ontario): La Esperanto Rondo de Otavo kunvenas du fojojn ĉiumonate ĉe kafejo Bridgehead kaj la Universitato de Otavo. Informoj ĉe **http://www.esperanto.ca/eo/ottawa**

**Toronto** (Ontario): Oni kunvenas ĉiun lundan vesperon ĉe kafejo Timothy's World Coffee ĉe stratoj College kaj Bay inter la 18h00 kaj 20h00. (Escepto: kiam lundo estas feritago, la kunveno okazas marde.) Informoj ĉe **http://www.esperanto.ca/eo/toronto**

**Tri-Rivero** (Kebekio): Esperanto-klubo en Tri-Rivero/Trois-Rivières bonvenigas vizitantojn. Skribu al **tririvero@esperanto.qc.ca** por ricevi informojn pri tempo kaj lokoj de kunvenoj.

**Viktorio** (Brita Kolumbio): Kunvenoj okazas en North Saanich ĉiun mardon de 13h00 ĝis 15h00 ĉe Golfludejo Ardmore, krom dum la somero. Informoj ĉe **http://esperanto.ca/victoria/**

## Kanadaj Esperanto-renkontiĝoj dum decembro:

**11-a de decembro**

**Otavo** (Ontario): Zamenhofa Festo de la otava esperantistaro de 18h30 ĝis 20h30. Pliaj informoj ĉe **http://www.esperanto.ca/eo/ottawa**

**12-a de decembro**

**Montrealo** (Kebekio): Zamenhofa Festo de la montreala esperantistaro ĉe restoracio Le Commensal (1720 St-Denis). Informoj ĉe **http://www.esperanto.qc.ca/eo/activites**

**Toronto** (Ontario): Zamenhofa Festo de la toronta esperantistaro ĉe la festoĉambro de 77 Carlton Street ekde 14h00. Informoj ĉe **http://www.esperanto.ca/eo/toronto**

**14-a de decembro**

**Kalgario** (Alberto): Zamenhofa Festo de la kalgaria esperantistaro ĉe la domo de Allan kaj Meredith Simon ekde 19h00. Informoj ĉe **http://esperantocalgary.blogspot.com/**

**15-a de decembro**

**Viktorio** (Brita Kolumbio): Zamenhofa Festo de la Klubo de Esperanto de Viktorio ĉe 930 Ardmore Drive ekde 13h00.

**Edmontono** (Alberto): Esperanto-tagmanĝo je 12h00.